

31 B^d Mariette
Boulogne s/M
la 29^{an} de Marto

Amiko kara

De tre longa tempo mi ne al vi skribis + mi leteron de vi ne ricevis. Sed mi ofte + ofte pensas al vi + al la pasintaj renkontiĝoj niaj en diversaj kongresoj. Ofte, mi rigardas vidaĵojn aŭ memoraĵojn de Praha + mi vidas + vivas ĉion kvazaŭ mi estus ankoraŭ tie. Malfeliĉe pasiĝis 13 jaroj de post la bela Praha Kongreso. 13 jaroj!! estas multe ĉu ne?

Mi ne scias ĉu vi ricevos tiun-ĉi leteron por Pasko, sed al vi mi deziras tre ĝojajn feliĉajn libertempojn. Tie-ĉi, la suno brilas, estas tre bela, seka vetero, sed tre malvarma. Frostis hieraŭ vespere. Tamen, la hotelestroj + restoraciestroj prepariĝis + esperas.

Hieraŭ 200 angloj alvenis aerplane por pasigi Paskon + ĉiu tage nune alvenas miloj per la ŝipo por Parizo k.t.p.

Ni ne vojaĝas almenaŭ malproksimen tiun-ĉi Paskon. Estas tro malvarme, cetere mi neniam fartas tre bone de kelkaj monatoj + mi timas multajn manĝaĵojn en diversaj restoracioj. Estas sufiĉe da allogaĵoj tute proksime por ni iri en aŭtomobilo, se nur estus al la mondfama "Le Touquet, Paris-Plage" je 1/2 horo de Boulogne.

Kiom da ĉagreno mi havis pro la morto de D^{roj} Felikso + Leono Zamenhof. Leono en sia lasta letero datumita 6 tagoj antaŭ sia morto, al mi skribis ke li tute ne deziris vivi.

Nun ne plu estas fratoj + neniuj por korespondi kun mi. Mi konservas la leterojn de 4 fratoj. La filinoj skribas de tempo al tempo sed malofte. Lidja vizitos min en Junio.

Ho! amiko, kian teruran epokon ni travivas!! Ĉiu tage oni sin demandas Kio okazas de nove hodiaŭ¹? Oni sin jetas² sur la gazetoj + la radio por informoj.

La 6^{an} de Feb. marŝo en Parizo estis glora! Tiuj vunditoj, maljunuloj kiuj marŝis antaŭen al la morto por ideo, por faliĝi la ministraron estos rememorigita dum longaj jaroj poste.

Kaj vi? + via familio? Eva devas esti granda + tiel interesa. Ĉu ŝi parolas Esperante? Mi esperas ke vi ĉiuj fartas bone + bestos feliĉaj dum Pasko.

Mi ofte aŭskultas "Bratislava" en la radio. Mi vidis tiun-ĉi urbon kiam nia ŝipo haltiĝis tie. La Hungaroj malkontentiĝis vidante ĝin + mi diskutis (tre diskrete kompreneble) kun ili.

Mi aŭdis foje Esp. ceremonion, paroladon muzikon el Brno. Estis tre klara + bonege parolita. Kiel Brno nomiĝis antaŭe?

Ĉu vi veturos al la Konferenco en Wien en Majo? Mi ne, ĉar mi jam estis en Wien, la lastan Aŭguston. Mi ricevas ofte belajn, longajn leterojn de Steiner (Esp. Muzeo en Wien).

Mi ne iros al Stockholm - tro malproksime. Ni veturos eble al Svisujo kie ni ripoziĝos 2 aŭ 3 semajnojn. Sed antaŭe mi iros al Parizo + Anglujo.

¹ ĉu "hodiaŭ" ?

² ĉu "jetas" ?

Nun, mi premas afekcie viajn manojn + al vi sendas korsentojn de via

Multjara amikino

Alice Sergeant

manskribita noto:

Zemřela na embolii 8.6.1934 v 7 h. ráno (po operaci z 30/5 1934))